

## Gazetara komunikaĵo de Eŭropa Attac-Reto

Freiburg, Germanio, 12-a de Aŭgusto 2011,

Pli ol 1 300 aktivuloj el ĉiuj partoj de la mondo kolektiĝis ĉe la Eŭropa Attac-Reta Akademio en Freiburg, Germanio, inter la 8-a kaj 14-a de Aŭgusto, por diskuti alternativojn al la tumultiga tutmonda ekonomia sistemo. La ekstrema situacio de la mond-financaj merkatoj estis la objekto de granda kritiko de la partoprenantoj.

“Attac ne estas ĉi-tie por diri *‘Tion ni jam refoje diris al vi!’* - malgraŭ la fakto, ke ni ja diradis ĵus tion, dum multaj jaroj. Ni havas konkretajn proponojn, kiel favori la homojn kaj la planedon anstataŭ skandalaj profitoj por minoritato. Ĉi tiuj proponoj efikos, se oni nur donus ŝancon.” diris Susan George, honora prezidanto de Attac France.

“Dum pli ol jardeko politikistoj ignoris niajn postulojn por demokrata rego super la financaj merkatoj – kaj eĉ nun, dum la aktualaj diskutoj pri bezono de pli da reguligo, la reala efektivigo de financ-transakcia imposto kaj aliaj reguligaj iloj ankoraŭ ne aperas. Malgraŭ belaj paroladoj kaj mondon-brakumantaj deklaroj ĉe G20 kaj aliaj internaciaj influhavaj forumoj, nur malsufiĉa reguligo estis realigita kaj eĉ tiu-ĉi eta strebo venas multe tro malfrue”, diris Hugo Braun, unu el la Germanaj organizantoj de la evento.

Paniko revenis al la financaj merkatoj. Malgraŭ tio, ke oni scias pri la ŝuldo-niveletoj de Usono kaj de la EU-landoj jam delonge, la kraŝo pravas refoje la malraciecon de la financaj merkatoj post la subengradigo de la ŝtataj ŝuldoj de Usono. Onidiroj pri la ebla subengradigo de francaj ŝtataj obligacioj plue plimalbonigis la spekulacian komercon.

“Ni alvokas ĉiujn homojn: Ekstaru de viaj televidaj kaj komputilaj ekranoj kaj aliĝu al la movado, kiu konstruas alternativojn al la krizo kaj agadas por pli bona mondo! Jen la plej bona metodo por certigi, ke ĉiu povas vivi bonan vivon bazita sur ekologie kaj sociale daŭrigebla bazo”, finas Benedikte Hansen, gvidanto de Attac Norvegio.

### La postuloj de Attac:

- Tuja enkonduko de financ-transakcia imposto por limigi spekulacion;
- Tuja rifuzo de ĉiuj spekulistoj kaj spekulaciaj rimedoj kiuj minacas la ekonomion kaj sociojn - inter ili senposeda vendado kaj kredito-kolapsaj vetoj.
- Ne! - al senkondiĉaj financaj sav-aranĝoj por bankoj. Bankoj kiuj ne povas supervivi sole estu metita sub publika respondeco kaj subigitaj al demokrata regado por servi al la bezonoj de la homoj kaj ne al la profito de privataj akciuloj;
- Ĉiuj financaj institucioj, kiuj estas konsiderataj tro grandaj por permesi eblan bankroton, devas esti dividataj en malpli grandaj entreprenoj;
- Ne! - al elspez-reduktaj rimedoj kaj Jes! - al novaj fontoj de ŝtata enspezo. Publikaj servoj kaj investado devas esti restarigataj, sed ne reduktataj. Iaj fiskaj rimedoj kiuj estas efektivigataj devas celi al redistribuado de riĉeco kaj produkti publikajn enspezojn;
- Ĉiaj publikaj ŝuldoj devas esti inspektataj de civitano-gvidata sendependa korpuso. Maljustaj ŝuldoj devas esti nuligataj;
- La Centra Banko de Eŭropo devas esti submetata al demokrata regado; ĝia mandato devas esti reviziata por permesi rektan financadon de la membroŝtatoj de la Eŭro-zono.

*(tradukita de Manfred Westermayer, lingve kontrolita de Ursula Niesert, 2011-08-22)*

Por pliaj informoj pri la Somera Akademio kaj pri ATTAC:

<http://www.ena2011.eu>

<http://www.attac.org/>

Esperantlingvan traktadon de tiuj temoj vi trovas en

- Le Monde Diplomatique [<http://eo.mondediplo.com/>]
- Monda Asocio Sociala (MAS) [<http://mas-eo.org/>]
- Asocio de Verduloj Esperantistaj (AVE): [[http://verduloj.org/k\\_finance.htm](http://verduloj.org/k_finance.htm)]